


Julio/Aŭgusto 2022

ESPERANTO-INFORMILO



© ĉe Ichigi121212 sur Pixabay

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo julio/aŭgusto
- El la klubo
- Literaturaĵo
- Diversaĵoj

Tempo por ferioj, tempo por UK ... Post du jaroj, kiam UK ne povis okazi, ĉi-jare finfine esperantistoj povas renkontiĝi dum unu semajno en la kanada metropolo Montrealo. Ni forte esperas, ke ĉi-jare la situacio pli bonos kaj ke ankaŭ aliaj bonegaj aranĝoj (kiel NR kaj Luminesk' kaj aliaj) denove povas okazi!

Kolofono

redaktoro: Anina Stecay (AS)

as.esperanto@web.de

korektintoj: R. Pflüger

W. Ullmann

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main

www.esperanto-frankfurt.de

Vorsitzender: Georg Hennemann

Rehgartenstr. 16

35683 Dillenburg

Tel. 02771-8196614

Bankverbindung:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M

IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01

BIC: DRESDEFFXXX

bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag

mit DEB-Beitrag: 96 €

Familienmitglied: 48 €

Nur ESF: 24 €

Familienmitglied: 12 €

Programo

Klubvespero

Klub-Abend

Atentu, ke la renkontiĝo la **1-an mardon de la monato** nun daŭre okazos **per Zoom**.

La surloka renkontiĝo la **3-an mardon de la monato** okazos en:

**Saalbau MÜZ Schönhof
Rödelheimer Str. 38
60487 Frankfurt**

Dienstag, d. 5. Juli 22

mardon, la 5-an de jul. 22

19:00 h

Plauderstunde per Zoom

Bisher noch kein Thema geplant.

19:00 h

Babilado per Zoom

Ĝis nun ankoraŭ sen fiksita temo.

Dienstag, d. 19. Juli 22

mardon, la 19-an de jul. 22



©Kian2018 ĉe Pixabay

18:30 h

Sprachrunde: Ach du grüne Neune – deutsche Slang-Ausdrücke und ihre Übersetzung (R. Pflüger)

19:30 h

Vortrag: Traditionelle Chinesische Medizin (A. Stecay)

Wer vorhat, in China Medizin zu studieren, kann an den Universitäten zwischen den Studienfächern Traditionelle Chinesische Medizin (TCM) und westliche Medizin wählen. Auch in Europa und den USA gibt es inzwischen immer mehr Praktizierende, und viele Patienten schätzen diese „milde Form“ der Medizin sehr.

Aber ist TCM wirklich eine „milde Medizin“? Für welche Krankheiten eignet sie sich besonders? Inwieweit (oder nicht) sind die Methoden durch evidenzbasierte Studien abgesichert? Woran erkennt man die Qualität eines TCM-Therapeuten? Und wie unterscheidet sich TCM überhaupt von z.B. traditioneller europäischer Naturheilkunde?

18:30 h

Lingva rondo: Aĥ vi verda naŭo – germanaj slangaj esprimoj kaj ilia traduko (R. Pflüger)

19:30 h

Prelego: Tradicia Ĉina Medicino - TĈM (A. Stecay)

Studonte medicinon en Ĉinio, oni povas decidi ĉu studi ĉe universitatoj aŭ la objekton tradician ĉinan medicinon aŭ ĉu okcidentan medicinon. Ankaŭ en Eŭropo kaj Usono intertempe praktikantoj de TĈM plimultiĝas, kaj multaj pacientoj tre aprezas la t.n. „mildan medicinon“.

Sed ĉu TĈM estas vere „pli milda medicino“? Por kiuj malsanoj ĝi aplikeblas? Kiom (aŭ kiom ne) ĝiaj metodoj estas bazitaj sur sciencaj esploroj? Kiel oni povas pritaksi la kvaliton de TĈM-terapeŭtoj? Kaj kiel entute TĈM diferencas ekz. de la tradiciaj eŭropaj formoj de naturkuracado?

Dienstag, d. 2. Aug. 22

mardon, la 2-an de aŭg. 22

19:00 h

Plauderstunde per Zoom

Bisher noch kein Thema geplant.

19:00 h

Babilado per Zoom

Ĝis nun ankoraŭ sen fiksita temo.

Samstag, d. 13. Aug. 22

Sabaton, la 13-an de aŭg. 22



13:00 h

Sommerfest

Es findet dieses Jahr bei Anina Stecay statt:

Blochbachstr. 26

63486 Bruchköbel-Roßdorf

13:00 h

Somera Festo

Ĝi okazos ĉi-jare ĉe Anina Stecay:

Blochbachstr. 26

63486 Bruchköbel-Roßdorf

Jeder bringt wie üblich einen Salat oder Kuchen für das gemeinsame Buffet und sein Grillgut mit; für Getränke ist gesorgt.

Leider ist Roßdorf am besten mit dem Auto zu erreichen (A45 Abfahrt „Langenselbold-West“, oder A66 Abfahrt „Hanau-Nord“). Parkplätze sind ausreichend vorhanden. Nach Bruchköbel kommt man auch mit dem Zug RB49 auf der Strecke Hanau-Friedberg, vom Bahnhof sind es dann aber ca. 30 Minuten Fußweg zu Aninas Haus. Busse gibt es von Hanau (562, 563, 33), von Hammersbach (563), von Erlensee (30), aber sie fahren nur ca. im Stundentakt; die Haltestelle heißt „Blochbachstraße“.

Ĉiu tradicie kunportas salaton aŭ kukon por la komuna bufedo kaj siajn rostaĵojn; la trinkaĵoj estos organizitaj.

Bedaŭrinde oni atingas na Roßdorf plej bone per aŭtomobilo (sur A45 eliro „Langenselbold-West“ aŭ sur A66 eliro „Hanau-Nord“). Parkejoj estas sufiĉaj. Al Bruchköbel oni povas ankaŭ trajnveturi per RB49, sed de la stacidomo estas ankoraŭ proks. 30 min. piedira vojo ĝis la domo de Anina. Busoj ekzistas de Hanau (562, 563, 33), de Hammersbach (563), de Erlensee (30), sed ili nur pli-malpli unufoje hore veturas; la haltejo nomiĝas „Blochbachstraße“.

Dienstag, d. 16. Aug. 22

mardon, la 16-an de aŭg. 22



19:00 h

Saalbau-Ferien – der Vortrag findet in Zoom statt!!!

Vortrag: Segeln (G. Hennemann)

Alleine auf einem Boot, sein eigener Kapitän sein ... das ist für viele Menschen ein Traum. Georg wird uns diesmal etwas über das Segeln erzählen und wie schwierig es ist, den Segelschein zu machen.

19:00 h

Saalbaŭ-ferioj – la prelego okazos en Zoom

Prelego: Velboatado (G. Hennemann)

Esti sola sur velboato, esti la kapitano kaj decidi, kien iri nun... tio estas revo por multaj homoj. Georg ĉi-foje rakontos al ni pri velado kaj kiel malfacile estas ricevi la licencon por tio.

Fascinado insuloj



La bela haveno de Chania/Kreto

© fietzfotos sur Pixabay

Jes, mi devas konfesi: Ankaŭ min treege ravas la etoso sur insuloj. Ĉu Korfu, ĉu Mallorca, ĉu Föhr – al miaj plej ŝatataj celoj por ferioj apartenas ĉefe insuloj. Kreta havas la ĝustan miksaĵon de ĉarma mediteranea pejzaĝo, komfortaj ebloj por naĝi, mirindaj arkeologiaj lokoj kaj treege afabla popolo (kiu malgraŭ la amaso de turistoj restas tre malfermita kaj helpema kaj kontaktema). Sansibar estas la ekzota revoloko kvazaŭ manifestiĝinta el piratoj-romanoj kun turkisa varma maro kaj blankaj plaĝoj. Sur la Kanariaj Insuloj (mi jam vizitis 4 el la 7, kelkajn plurfoje) oni povas trovi la plej densan apudeston de ĉiam spirhaltiga, kvankam foje magra pejzaĝo, invitanta vin al migrado, kaj interesa loka kulturo, tutjare agrabla klimato kaj bongusta manĝaĵo. Kaj Irlando estas la amo de mia vivo.

Kial multaj homoj estas tiom fascinitaj de insuloj?

Unue kompreneble, naĝado en la maro estas unu el la plej fortaj asocioj al „ferioj“ (eĉ por tiuj inter ni, kiuj mem ne nepre vere naĝas), kaj evidente insuloj havas rilate al sia grandeco tre longan marbordon kompare kun aliaj regionoj, tiel ke oni povas trovi kvietajn strandojn kaj infrastrukture bone organizitajn amasplaĝojn, laŭplaĉe. Krome, pro la interagado de la naturaj fortoj de akvo kaj vento, la marbordo en si mem estas tre speciala pejzaĝo, kiu povas formiĝi tute malsamkaraktere en diversaj lokoj – kun klifoj aŭ ebena strando aŭ kun dunoj, ĉio allogas siamaniere.



La famaj kretaj rokoj de Rügen © ĉe BNPT sur Pixabay

Por mi unu el la plej fascinaj trajtoj estas la fakto, ke ĉiu insulo estas kvazaŭ malgranda propra mondeto – pro la multjarcenta relativa izolo evoluis propraj tradicioj, propraj konstrustiloj, propra kuirarto. Tio ekzemple sur la Kanariaj Insuloj tre bone videblas: Malgraŭ sama deveno (vulkana aktiveco dum relative simila epoko) kaj sama klimato kaj proksimume samtempa koloniigado (14-a jc.) far Hispanujo, la pejzaĝo de Lanzarote, vaste kovrita de nigra lafo, la verdaj altaĵoj de La Gomera kun nebul-praarbaro, kaj la magraj dezertecaj montaroj de Fuerteventura aspektas kiel tute malsamaj regionoj de la tero.

Due ankaŭ por homoj, kiuj interesiĝas pri biologio, insuloj havas apartan allogon: faŭno kaj flaŭro sen interŝanĝo kun aliaj regionoj ofte naskis siajn proprajn



Ĉarmaj urbetoj en fekundaj valoj inter krutaj montoj – Gran Canaria © ĉe MonikaVolpin sur Pixabay

speciojn (kiel la fama birdo Dodo sur Maŭricio, la marsupiuloj en Novzelando kaj aliaj).


Sur nur malmultaj kvadrataj kilometroj oni povas malkovri ion tute apartan.

Eĉ en Eŭropo ekzistas multaj insuloj, kien ankoraŭ ne vojaĝas multaj aliaj turistoj, ekzemple kelkaj el la pli ol 3000 grekaj insuletoj.

Trie: kiu serĉas veran solecon, povas trovi ankaŭ tion – en Tajlando aŭ sur la Maldivoj oni povas ferii sur tute privata insuleto.

Por tiuj homoj, al kiuj dusemajnaj ferioj en luata apartamento ne sufiĉas, ekzistas eĉ la eblo aĉeti insulon. Pluraj makleristoj en la reto ofertas etajn insulojn, kie oni estas „sia propra mastro“. Tio iĝis iaspeca modo inter la riĉuloj de la mondo – ĉar kompreneble por tio oni devas investi iom da mono. 2.5 milionojn da eŭroj oni devas pagi por insulo de 10.000 kvadrataj metroj en Grekio. Kontraŭ malpli ol 1 miliono oni povas ricevi eĉ 39.000 kvadratajn metron kun tri domoj, sed en Nova Scotia en Kanado: bela kaj soleca, sed kie la klimato ne nepre invitas al naĝado.

Persone, mi do tamen preferas elspezi la monon por feriumado – tiel oni povas almenaŭ profiti la grandegan diversecon, kiu ekzistas inter la plej belaj lokoj de la mondo ... Do kien vi veturos venontfoje?



El ekzempla anonco en la reto: „Spectacle Island“ ie antaŭ la kanada marbordo (longeco ~500m) aĉeteblas kontraŭ iom mlapli ol 1.000.000 € ...

(AS)

El la klubo

Naskiĝtagoj

En julio festos siajn naskiĝtagojn:

Dr. Robert Bittner, 06.07.
Katarina Eckstädt, 09.07.

En aŭgusto festas siajn naskiĝtagojn:

Klaus Rumrich, 01.08.
Anina Stecay 29.08.

Ni kore gratulas!

Literaturo

La kostoj eksplodas

de Felmano Ulriko

Damne! Ĝi okazis denove! Kiom tio kostos... Sed ne estas alternativo...

{premas butonon}

Krei novan teron?

{premas butonon jes}

Al kiu dato retroiri?

{entajpas 754 a.Kr.}

Ĉu vi volas pagi tridek Zorkmidojn?

...ne vere... sed la eraro jam kuŝas en tiu fia Romio. Mi sciis jam antaŭe, ke ne sufiĉas eviti la mondmilitojn, la tridekjaran militon, mortigi tiun Luteron, ne eĉ haltigi la turkojn, la arabojn, tiujn ĝermanajn hordojn... jam la Romia Imperio estis la eraro! Aŭ eble eĉ jam la grekoj, kiuj forviŝis la pelasgojn, ĉu? Ĉiukaze, jam tro multe da mono elspeziĝis... Ne plu hezitu nun preni la problemon

je la radiko! La fenicoj devas travivi, tute alia linio de historio necesas, tiu de komercistoj, ne tiu de soldatoj. Kiom tiu temporefaro kostas! Ĝia kosto estas ja tre alta... sed ne estas alternativo. La okdeksepan fojon la mondo fiaskiĝis, ĉi-foje denove pro drasta klimatoŝanĝiĝo, lastafoje pro nuklea milito, antaŭe trifoje sinsekve pro viruso el ŝtata laboratorio...

{premas butonon jes}

Tero estas restartota je 754 a.Kr. Konfirmu

{premas butonon jes}

30 Zorkmidoj prenitaj de la konto de Adonajo Jehovo. Restas 27 Zorkmidoj

Jen eble mia lasta ŝanco pruvi, ke tiaspeca universo povas produkti daŭripovan inteligentan specion.

Perdite! (Rakonto laŭ vera okazaĵo)

de Felmano Ulriko

Kiam Julio ekflugis, la fermo de limoj jam estis diskutata. La registaro informis, ke la fermo ne okazos dum la sekvaj tagoj, oni sufiĉe frue informos. Li decidis viziti lian fratinton semajnfine, eble lastaŝance antaŭ ĝenerala nevojaĝeblo de nekonata daŭro.

Nun en la flughaveno Frankfurto oni informis, ke Germanujo jam ne enlasas hispanojn. Domaĝe. Perdita mono kaj tempo. Li telefonis al Areli. "Mi devas tuj reflugi", li diris. Sed... tio ne realiĝis. Ankaŭ Hispanujo jam estis ferminta la limon. Eĉ por hispanoj el eksterlando. "Ne povas esti, kien mi iru?" Sed vere estis tiel.

Li havis sian valizon. Ne grandan, nur tiun sufiĉantan por tritaga vojaĝo. En ĝi estis du pliaj vestaĵogarnituroj. Li havis monon. Li iris manĝi. La valizon li ĉiam kunportis. Ĝi faris tiujn tipajn sonojn de la etaj plastaj radoj, kun tiu klaksono je ĉiu paso de limo inter du kaŝeloj. Restoracioj tamen pro la epidemio estis fermitaj. Iuj budoj plu funkciis. Li eltrovis la lokojn bezonatajn. Necesejon. Manĝobudon. Informgiĉeton. Sidlokon kun bona vido eksteren, al la vasta areo kie staris la aviadiloj, sed iĝis

malpli da startoj kaj surteriĝoj.

Tempo forpasis. Li dormis sur la planko. Matene duŝis. Tiris sian valizon de loko al loko. De dormloko al la necesejo kaj duŝejo. De tie al manĝobudo, ĝis ankaŭ ili fermiĝis. De tie al la informgiĉeto. Ĉu novaĵoj. Ne. Tiris la valizon al telefonejo, la baterio de la saĝtelo malpleniĝis. La konsulato provas fari ion, sed ne povas ion promesi. Sed organizos alporton de manĝaĵo. Li tiris la valizon al la atendejo kun la bona elrigardo eksteren, al la vasta areo kie staris la aviadiloj, kiuj nun ne plu flugis. Ankaŭ ne plu estis multaj aliaj homoj. Kelkaj purigistoj, oficistoj, teĥnikistoj, policistoj. Kion vi faras ĉi tie. Mi atendas. Vi ne rajtas ĉi tie resti. Pardonu, mi ne rajtas la lokon forlasi. Ĉu.

Post ses tagoj, ĉiuj restintaj oficistoj konis lin. Li estis la homo, kiu tiras valizon tra la flughaveno.

Daŭris pliaj deksep tagoj, ĝis kiam li povis reflugi Hispanujen. En pilota dormkabino de frajtoaviadilo.

Kvizo: Insuloj

Mi prezentas al vi nun en la feria sezono kvizon pri insuloj kaj ĉion rilate al tio. Atentu, ke laŭ oficiala difino insulo estas „ĉiu teramaso komplete ĉirkaŭata de akvo, kiu eĉ dum alta akvo troviĝas super la akvonivelo, kaj kiu ne estas kontinento“.



© ĉe Julius_Silver sur Pixabay

1. Kiom da oficialaj ŝtatoj en la mondo apartenas al la tielnomataj „insulo-ŝtatoj“ (= konsistas nur el insuloj k ne havas ajnan teritorion sur unu el la kontinentoj)?
A – 21
B – 35
C – 47
D – 70
2. Kiu lando en la mondo posedas plej multe da insuloj (kaj maraj kaj lagaj kaj riveraj)?
A – Svedujo
B – Indonezio
C – Kanado
D – Kroatio
3. Kio estas „fantom-insulo“?
A – ne vere ekzistanta insulo, kiu ŝajne videblas en ioma distanco de la marbordo nur pro tre specialaj veterfenomenoj (simila al fatamorgano)
B – insulo kiu aperas sur malnovaj mapoj aŭ estas priskribita en antikvaj tekstoj, sed ne estas pruvita/ trovita per la hodiaŭaj mezurmetodoj
C – insulo iam enloĝita nun forlasita, kie videblas restoj de la iama civilizacio
D – insulo hantata
4. Kiu germana vorto NE havas la signifon de insulo?
A – Kaupe
B – Au(e)
C – Werth
D – Fleet
5. En la plej granda germana lago, la Konstanca Lago, troviĝas ankoraŭ 13 insuloj. Kiom el ili estas daŭre enloĝataj?
A – 1
B – 3
C – 5
D – 7
6. Ekzistas pli ol 20 insuloj en la mondo, kies teritorio estas dividita inter du ŝtatoj. Sed kiu el la sekvaj insuloj estas dividita inter pli ol du ŝtatoj?
A – Borneo
B – Irlando
C – Granda Insulo de Fajrolando
D – Sankta Martino
7. Sur kiuj insuloj troviĝas la plej altaj montoj?
A – Honŝu, Sumatro kaj Tenerifo
B – Novgvineo, Havajo kaj Borneo
C – Sudinsulo de Novzelando, Tajvano kaj Ross-Insulo
D – Javo, Grenlando kaj Sicilio
8. Kiu el tiuj eŭropaj insuloj akceptas la plej multajn turistojn ĉiujare?
A – Majorko
B – Tenerifo
C – Kreto
D – Irlando

Solvo de la junia enigmo

La ununura vera klaĉaĵo estis, ke Karlota havas malpli ol 50 kuniklojn. (Fakte ŝi havas malpli ol 30, tiel ke la frazoj 1 kaj 2 estas malveraj.)

La ĝustan solvon trovis tre rapide Reinhard kaj Hartmut. Gratulon!

Vortoj de la monato

Hodiaŭ mi prezentas la vorton **ekipi**:

Laŭ NPIV: Provizi iun aŭ ion per ĉio necesa por la difinita funkcio – do tio ne nur rilatas al personoj! *~i armeon per aviadiloj, urbon per aŭtobusoj, ŝipon per ŝnuraro, turiston per gvidlibroj; la fabriko estis ~ita per plej modernaj maŝinoj.*
(germane: ausrüsten, ausstatten)

Ŝerco

Kliento donas al tradukisto 400 vortojn, por ke li traduku.

„Kiom longe vi bezonas?“

Tradukisto: „Proksimume unu semajnon.“

Kliento: „Vi bezonas unu semajnon por traduki nur 400 vortojn!?”

Dio kreis la mondon ene de ses tagoj!“

Tradukisto: „Nu jes – sed rigardu la mondon! Kaj poste rigardu mian tradukon...“